

## INTERNACIA KOMISIONO „ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO”

(I.K.E.S.).

Raporto pri la agadjaro 1952/53.

- I. Generale: Starigo. — Celo. — Pratika ellaboro. — Efiko. — Problemaro.
- II. Publikigado pri la komisiono kaj pri sociaj temoj.
- III. Komisiona Rondo kaj kontaktoj.
- IV. Diversajoj.

### I. GENERALE.

Povas esti utile komenci ĝenerale informante per resumo pri estiĝo kaj celo de la komisiono.

#### Starigo.

Ĝi stariĝis sekve de decido inter kelkaj esperantistoj, fakuloj en la sociologia kaj sociala kampoj, (kunvenintaj dum la 35a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo, 1950) post konsideroj pri la disvastigprocedo de la Internacia lingvo, kiu povas konduki al:

1. teknika solvo por la mondproblemo de lingvodiverseco;
2. rekono inter la popoloj de soci-kultura egalrajteco de la naciaj lingvoj ankaŭ de relative malgrandaj lingvoteritorioj kaj
3. pacaj rilatoj kaj celtrafa evoluo de mondo libera.

#### La komisiono celas:

- A. progresigi la praktikadon de la internacia lingvo inter tiuj, kiuj okupas sin pri sociologio, science aŭ aplike;
- B. kontribui en la aplikadon de sociologio por la Esperanto-movado;
- C. helpi laŭpove al la disvolvo de internaciaj rilatoj en la sociologia tereno kaj
- D. al internacia pliprofundigo de la kono pri interhomaj kaj intergrupaj rilatoj kaj pri ŝanĝoj de aŭ en sociaj institucioj kaj ideoj;
- E. kunlabori en la kadro de la koncernaj organizaĵoj por la celoj menciitaj.

#### Praktika ellaboro.

Por la praktika parto de tiu alcelado valoras ke oni kontaktu kun siaj esperantistaj estraroj kaj grupoj por:

- a. serĉi kaj renkonti organizitajn esperantistojn, kiuj profesie aŭ stude okupas sin en la socia sektoro;
  - b. trovi la „ripozantajn” aŭ „forĝesitajn” esperantistojn en la socia sektoro.
- La agadmaniero trovi tiujn personojn kaj konatiĝi kun ili estu sufiĉe sistema; oni, se eble, laboru por tio kun la diversaj eroj de la esperantista socio.

Persona kontakto kun sociistoj-esperantistoj por vigligi la atenton por Esperanto kaj sociologio estas la plej bona maniero.

Kiam evidentiĝas ke la kontaktoj pere de esperantistaj rilatoj estas sufiĉe plenumitaj kaj konstantigitaj, tiam oni, (celtrafe klarigante la aferon) petu enquete informon ĉe konvenaj entreprenoj, institutoj, instancoj, ĉu en ilia per-

sonaro estas kunlaborantoj, okupitaj pri sociaj temoj, kiuj lernis esperanton.

El tio rezultos:

- 1e. ke oni trovos esperantistojn ne (plu) konatajn;
- 2e. ke ĝenerala atento estos vekata por esperanto; tiu paŝo povos esti sekvata de klopodoj akiri novajn aktivajn interesigaĵojn.

#### Efiko.

La alvoko kaj la invitoj de la komisiono ricevis ĝis nun ne sufiĉe da resonado pro tro modesta atento por kaj malgranda aktiveco en nia movado por la afero mem. Nia rondo de kunlaborantoj do ne estas kontentiga laŭ amplekso kaj laŭ kvalito. Ne forgesu, krom tio, ke la socia sektoro estas tre varia en taskoj kaj okupoj, kaj por evoluigi rilatojn oni bezonas pliajn kontaktojn.

La socia sektoro de la Esperanto-movado estas okupita de proporcie mal multe da esperantistoj.

#### Problemaro.

Pri la problemoj ni observas jenon:

La efektivigado de praktikaj internaciaj rilatoj estas ĝenerale ne simpla en la socia sektoro kaj estas tiel sama en la esperantista medio ĉar la socio, kiel rilato-ideo, estas ege ligita kun la problemaro de grupoj, distriktoj de loĝado kaj okupoj, la regiona aŭ nacia kulturo. Tamen, jam ekzistas valoraj rezultoj de internacia kunlaboro en la socia sektoro nome tiuj de Internacia Labor-Oficejo (ILO); Eduka, scienca, kultura organizo de la Unuiĝintaj Nacioj (UNESKO); Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (EKOSOK), Internacia Sociologia Asocio (ISA), Internacia Instituto de Sociologio, Internacia Konferenco pri Sociala Laboro, ktp.

Estas klare ke tiuj faktoj speciale devigas la esperantistaron enkonduki pli aktive la aplikadon de Esperanto en la sociologian kaj socialan mediojn. Pro tio necesas diversspeca prepara kaj efektiva laboro. Jen la laborkampo de la Internacia Komisiono „Esperanto kaj Sociologio”.

El la notoj pri la antaŭa agadjaro ni citas:

Estas grave ke Esperanto pli kaj pli estu aplikata en sciencaj kaj fakaferoj. Pro tio la esperantistoj en diversaj stud- kaj agadkampoj jam grupiĝis. Ni ne postrestu.

La socia sektoro de la homa okupo temas pri la interrilato, la interpersonaj kaj intergrupaj kontaktoj. Ĝi temas pri la interfunkcio, la vivo inter la medioj, la peradeca medio. Do ne eta afero kiam ni tezas tiel nian socialan laborvivkoncepton.

Sociologiistoj kaj deĵorantoj en la sociala prizorgo estas servantoj de la rilato, de la interligo. Pri ilia laboro atestas individuaj personoj, „hejmo kaj fajrujo”, sed ankaŭ entreprenoj kaj produktado.

Por efektiviĝi la socialan tendencon tre valoras ĝenerala internacia lingvo kiel pontlingvo kaj necesas sistemo de kontaktoj inter esperantistoj kiuj estas okupitaj profesie aŭ/kaj stude de sociaj kaj socialaj aferoj.

## II. PUBLIKIGADO pri la Komisiono kaj pri sociaj temoj.

I.K.E.S. publikigis interalie en la U.E.A.-jarlibro tutan paĝon pri sia celo, la rimedoj, la konsisto de la komisiono kaj la rondo de la aprobantoj, kaj en Nova Internacia Jarlibro (New International Year Book) eldonita de Funck kaj Wagnalls, Novjorko, detalan artikolon.

La komisiono atentigis per korespondado kaj per kunvenoj resp. prelegoj en la Universalaj Kongresoj de Esperanto en Oslo kaj Zagreb pri sia funkciado.

Laŭ deziro de la ĝenerala kunveno sekvas tie ĉi mencioj pri kelkaj okazaĵoj kaj eldonaĵoj en la raportperiodo.

En Internacia Somera Universitato prelegis pri:

La socia pozicio de la virino en Indonezio: s-ino Rankanjo Ch. Datoe Toemenggoeng, Djakarta (Indonezio), Oslo 1952;

La malfavora situacio de la sciencistoj en la diversaj landoj: Prof. D-ro F. Egami, Nagoya (Japanujo), Oslo 1952;

La origino de la eŭropa kulturo: Prof. D-ro Emil Smith, Oslo (Norvegujo), Oslo 1952;

La ŝanĝiĝo de la distribuo de la loĝantaro en Britujo: Universitata lektoro S-ro R. H. Osborne (Britujo), Zagreb 1953;

La ekonomio de la agrikulturo en Jugoslavujo: D-ro Inĝ. Oton Pancer, Sarajevo (Jugoslavujo), Zagreb 1953;

Usona kaj Svisa federalismo: Prof. D-ro Edmond Privat, Neuchâtel (Svisujo).

Okazis en aŭg. '52 Internacia konferenco de esperantistaj studentoj kaj altlernejoj kiu i.a. traktis pri: La sociaj problemoj de la studentaro en diversaj landoj; Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj (I.F.E.S.A.) estis fondata.

Aperis en la raportperiodo speciale menciindaj eldonaĵoj nome:

Prof. D-ro Ivo Lapenna: „Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo”. El la enhavo ni citas: 1. Fundamentaj nocioj; Nacio kaj ŝtato. — Interŝtataj rilatoj kaj internacia juro. — Pri la koncepto de la diplomatio. — La federalisma principo. — 2. Lukto por la paco per juraj rimedoj. — Metodoj por solvado de internaciaj konfliktoj. — La Internacia Kortumo kaj ĝia rolo. — La internacia krimo. — La fundamentaj homaj rajtoj kaj ilia jura protekto. — 3. Interŝtataj organizaĵoj; La bazo kaj formiĝo de Unuiĝintaj Nacioj. — La funkciado de Unuiĝintaj Nacioj. — Aliaj interŝtataj organizaĵoj.

Plue aperis:

Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto; Petro Stojan; eld. Flandra Esperanto-Instituto.

Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj; Eldonaĵo de Slovenia Esperanto Ligo, Ljubljana 1953.

Faktoj pri Norvegujo: H. A. Rosbach, Eld. Chr. Schibstets Forlag, Oslo 1953.

Tributo al Nobla Geniulo: Edmund Yardley; tradukis el la angla lingvo Francis R. Jones, eldonis Land and Liberty Press Ltd, London; pritraktas la personon kaj vivon de Henry George (1839—'97) konata pro la teorio de ter-valora-impostado.

Bulteno de Nederlanda Sindikata Konfederacio, revuo pri detalaĵoj de la sindikatoj, laboristaj aferoj ĝenerale, socialaj leĝaj aranĝoj, labor- kaj produktadproblemoj, ktp.

El la artikoloj aperintaj ni mencias (E = „Esperanto” de U.E.A.; S = Scienca Revuo):

La statistiko pri la Esperanto-movado, Centro de Esploro kaj Dokumentado (E. jun. '52).

Milito, paco kaj mondorganizo en la lumo de la Kristana filozofio prijura, Prof. D-ro A. Verdrosz—Droszberg; traduko de D-ro A. Halbedl (S. jun. '52).

Militpropagando, D-ro W. Winsemius; traduko de D-ro W. P. Roelofs (S. jun. k. nov. '52).

La socia pozicio de la Esperanto-movado, Hans Jakob (E. nov. '52); citaĵo: „La Esperanto-movado kiel tutaĵo estas hodiaŭ grava socia elemento. Pro sia „universaleco ĝi ne estas periferia t.e. vivante kaj agente ĉe la rando de la „socio. Ĝi ne estas sekto apartiĝanta aŭ sin fermanta aŭ izoliĝanta de la cetera „mondo. Pro la penado por interpopola kompreno kaj pro la praktika servado „ĝi fariĝis eminenta faktoro en la socia vivo.”

Signifo de la Rezolucio de UNESKO pri Esperanto, Prof. D-ro Ivo Lapenna (E. jan. '53).

Lastatempaj eksperimentoj pri Esperanto en lernejoj, F-ino V. C. Nixon (E. febr. '53).

Kiel vigligi niajn grupojn? André Albault (E. marto '53):

La rolo de landaj asocioj en la Tutmonda Esperanto-movado, D-ro P. Kempenneers (E. jul./aŭg. '53).

Laŭ intenco de la komisiona kunveno ni petas sendi sciindaĵojn el Esperanlingva fakliteraturo pri sociologiaj aŭ socialaj temoj al la sekretario de I.K.E.S., Moerweg 76, Den Haag, Nederlando.

Estas la deziro de la komisiono eldonigi siatempe kelkajn studlibrojn pri sociologio kaj pri socialaj temoj, ĉar libroj tiaj ĝis nun mankas en la Esperanto-literaturo.

## III. KOMISIONA RONDO kaj KONTAKTOJ.

Konsisto de la komisiono: D-ro W. Solzbacher, prezidanto (Usono); C. J. Keur, sekretario (Nederlando); Prof. D-ro G. Campetti (Italujo); s-ino J. Corbisier—Scheerlinck (Belgujo); W. A. Gething (Britujo); Prof. L. Laurat (Francujo). Aprobantoj aŭ kunlaborantoj: D-ro E. J. Görlich, E. Werner (Aŭstrujo); B. Silva, P. E. Simon (Brazilo); S-ino M. Le Bondidier (Francujo); D-ro A. Bormann, W. Bornemann (Germanujo); J. Anglada Prior, A. M. Botella, J. Guzman (Hispanujo); K. Ikegawa, J. Kawahara, T. Keikoan, K. Matsumoto, Noboru Hayakawa, K. Nonomura, M. Okada, D-ro M. Ookubo,

H. Shioya (Japanujo); f-ino L. Adelaar, Prof. D-ro J. Prins, S-ino P. J. Wijnen (Nederlando); D-ro J. Hamvai (Nov-Zelando); J. Antunes (Portugalujo); Y. Cederholm (Svedlando); T. Crawford (Usono).

Pri la komisiona rondo adreslisto estas farita je la dispo de interesiĝantoj-fakuloj. Necesas aldoni je tiu mencio ke la listo nur estas klopodo grupigi la nomojn: ĝi ne pretendas doni sciencan ensistemigon. En ĝi troviĝas la nomoj de tiuj kiuj rekte kontaktis kun la komisiono kaj de kelkaj delegitoj kiuj deklaris sin pretaj funkcii en U.E.A.-kadro en iu fako socia.

Speciale estu menciata tie ĉi la kontribuo en la kontaktoj faritaj de S-ro Mitumasa Okada, studento en socia scienco en la Hitotsubaŝi universitato, Tokyo, Japanujo, kiu estas studenta sekretario de Esperanto-societo de la Universitato.

Specialiston en Svedujo, kiu interesiĝas pri la temo „Laboro por difektuloj” ni kontaktigis laŭ peto kun specialisto en Usono, kiu kiel edukisto okupas sin kun korp-difektuloj; ankaŭ ni povis proponi al la sveda kolego adreson en Japanujo de universitata lektoro pri Infanprizorgo kiu interesiĝas cele pri sociala servo. Ĉiuj esperantistoj!

En Oslo ni parolis i.a. pri folkloro kiu donas interesan parton en la socia observo, speciale kiam ĝi estas metata en internacian kadron; el ĝi povas evidentiĝi io pri sociaj praaj rilatoj, socia leĝeco, simbolaj esprimmanieroj, ktp. La folkloro parte povas kontribui al pliprofundigo de la socia scienco. Stariĝis en 1953 provizora kontakt-rondo pri folkloro: S-ino M. Le Bondidier (Lourdes, Francujo); direktorino de la Muzeo pri la Folkloro de Francujo; D-ro J. Hamvai (Auckland, Nov-Zelando); S-ro Noboru Hayakawa (Otarusi, Japanujo).

S-ro Pedro-Emanuel Simon el Porto Alegre, Brazilo, komunikis ke la ĝenerala gvidantino de la kantinstruo en la elementaj lernejoj en lia ŝtato liveris al li folkloran materialon el kiu li faris kelkajn esperantigaĵojn por la Instru-Ministerio de la Respubliko de Gvatemalo, kiu organizis folkloron festivalon en Julio '53.

La komisiono pritraktis informpeton pri laboro en industrio, agrikulturo resp. komerco de gelaboristoj pli junaj ol 14 jaroj.

La Komisiono esprimis la deziron ke estu estontece iu dum-kongresa aranĝo en la sociologia kaj/aŭ sociala kampo. Ni ĝojas pri la fakto ke en la kadro de la Zagreba kongreso L.K.K. povis anonci ke la direktoro de la plej granda Kroata elektromaŝin-fabrika „Rade Končar” invitos grupon dum la kongreso por vizito al la entrepreno kaj plue ke por interesiĝantoj inter la kongresanoj vizito estis aranĝata al „Infana Urbo”.

#### IV. DIVERSAĴOJ.

Socia konsisto de la Esperanto-movado; enkonduka esploro.

Pri tiu esploro en la kadro de la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de U.E.A. ni komunikas ke la sekretario en la raportperiodo 1952/'53 daŭre okupis sin pri la temo, raportis provizore en Oslo per prelegoj en la unua

sekcio de la kongreso (Eduko, grupa organizo) atentigante pri la utilo dokumenti pri grupoj kaj movado, utiligante la jam disponeblan materialon, kaj en la dua kongres-sekcio (Sciencoj kaj Tekniko) pri la ĝistiamaj stato de la esploro.

En novembro 1953 C.E.D. publicis koncizan raporton pri la rezulto de la farita enketo en „Esperanto” de UEA.

Internacia kunordigo de Esperanto-instruo.

En la raportperiodo 15 diverslandaj populuniversitatoj kaj similaj kleriginstitutoj komencis laŭ iniciato de S-ino D-ro Tine Peter Ruetschi, Zürich (Svisujo) internacie kunordigitajn Esperanto-kursojn.

Pro tio tiuj institutoj kunlaboris en speciala instrukadro kaj la gestudentoj, post kelkaj semajnoj, kontaktis koresponde kun siaj gekolegoj eksterlandaj. La centro de la kunlaboro estis la Popolaltlernejo en Zürich en kiu instituto d-rino Heidi Baur Sallenbach gvidis la Esperanto-kurson; la organizan parton de la internacia leter-korespondo prizorgis S-ro Werner Laederach. Nia komisiono interesiĝis pri la afero ĉar temis pri estiĝo de rilatoj per Esperanto laŭ nova metodo inter instru-institutoj kaj inter lernantoj en diversaj landoj, do temo kun speciale gruprilataj aspektoj. La sekretario okupis sin pri tiaj kursoj en la kadro de la internaciaj kontaktoj kaj verkis raporton pri la labormaniero kaj spertoj en la Haga kurso.

#### Internacia Komisiono „Esperanto kaj Sociologio”, (I.K.E.S.).

Resuma raporto pri ĝenerala kunveno, okazinta la 29an de julio 1953 en la Kongresejo de la 38a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb.

Tagordo: 1. Malfermo; 2. Ricevitaj komunikoj; 3. Protokolo de la antaŭa kunveno; 4. Jarraporto; 5. La laboro en la nova periodo; 6. Ronddemando; 7. Fermo.

Ceestas 12 personoj el 6 diversaj landoj, nome en alfabeto vicordo: ges-anoj Louise Adelaar (Nederlando); Klaaske Brouwer (Nederlando); Mercedes Budau (Jugoslavujo); Branka Dimitrijević (Jugoslavujo); Cornelis Keur (Nederlando) sekretario; Werner Laederach (Svisujo); Jo Le Rütte (Nederlando); Erik Salberg (Jugoslavujo); Erich Sandner (Germanujo); D-ro William Solzbacher (Usono) prezidanto; Ernst Werner (Aŭstrujo).

1. La prezidanto, D-ro Solzbacher, malfermas la kunvenon, bonvenigas la ĉeestantojn kaj atentigas pri la celo de la komisiono: renkontigi la fakulojn en la sociologia kaj sociala terenoj pere de la internacia lingvo Esperanto por progresigi la interkompreniĝon de la koncernaj scienculoj kaj aplikantaj specialistoj en la tuta mondo.

2. El la ricevitaj leteroj kaj komunikoj estas menciataj: salutoj kaj bondeziroj por la kunveno, skribe esprimitaj de s-roj J. Anglada Prior (Hispanujo); Walter Bornemann (Germanujo); Prof. D-ro Gaetano Campetti (Italujo); José Guzman (Hispanujo); Pedro E. Simon (Brazilo).

Invito al la komisiono de s-ro Aŭgusto de Castro, prezidanto de la organiza komitato de la 14a Brazilia Kongreso de Esperanto (7/14 januaro 1954 en Curitiba, centjara ĉefurbo de la ŝtato Parano) partopreni la kongreson kaj la festajn aranĝojn. La komisiono decidis sendi al s-ro De Castro dankesprimon por la invito kaj sukcesdezirojn por la entreprenota organizlaboro de niaj Brazilaj samideanoj; la komisiono bedaŭrinde ne povos reprezentigi sin en la Brazilia kongreso.

La prezidanto mencias pri la 2a kongreso pri sociologio en Liège, Belgujo, de la 24a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro 1935 kiu estas aranĝita de I.S.A. (International Sociological Association, sekretariejo en Oslo); por tiu kongreso la prezidanto kaj sekretario de I.K.E.S. enskribigis sin; plue

Al la publika internacia konferenco pri „La naskiĝo de Eŭropo, spirita problemo” okazonta en Den Haag, (24/30 aŭgusto '53) la sekretario partoprenos.

3. La protokolo pri la antaŭajara ĝenerala kunveno de la komisiono je la 8a de aŭgusto en Oslo, estas aprobata.

4. La sekretario raportas pri la laborjaro 1952 (vidu la raporton).

5. La komisiono daŭrigas la laboron en la nova jarperiodo kaj turnos sin al la delegitoj de Universala Esperanto-Asocio por inviti ilin: instigi esperantistojn, kiuj estas laŭ profesio aŭ studo specialigitaj en sociologio, socialaj aŭ socialaj aferoj, iĝi fakdelegitoj por ke reto de esperantistaj rilatoj inter la koncernaj fakuloj eblus en la estonteco. Tiuj, kiuj kiel esperantistoj interesiĝas pri la celo de la komisiono estas petataj diskonigi la ideon kaj ankaŭ ili (en kunlaboro de sociologo aŭ sociisto-ne-esperantisto) povas kontribui siaflanke en la afero nome per esperantigo de koncizaj informoj kaj komunikoj pri sociologiaj aŭ socialaj temoj.

Specialan mencion meritas la laboro farita de la Kroatia Esperanto-Ligo por la pristudo de la socia strukturo de la Esperanto-movado en Jugoslavujo. La artikoloj aperintaj ekz. en La Suda Stelo atestas pri science rekoninda pri-trakto de la temo kaj la komisiono esprimas estimon kaj dankon tiurilate speciale al s-roj Marinko Gjiĵo kaj Zvonko Rehorčić.

6. El la diversaj komunikoj kaj diskuto en la kunveno evidentiĝas ke la komisiono plenumas necesan taskon inter la Esperanto-organizaĵoj, plue ke la laborkampo de la komisiono estas tre vasta kaj ke la kunlaborantaj specialistoj-esperantistoj ĝis nun estas tro malmultaj. La kunveno esprimas la esperon ke la komisiono fervore daŭrigu la iniciatitan utilan laboron malgraŭ la modestaj rimedoj pri kiuj ĝi disponas.

7. La prezidanto, kore dankante la kunhelpantojn kaj interesiĝantojn en la priokupoj de la komisiono, fermas la kunvenon.

Corn. J. Keur.

## pri la aperonta SCIENCA KAJ TEKNIKA TERMINARO (STT)

de R. Haferkorn kaj C. Dellian,  
kontrolita de prof. d-ro F. J. Belinfante.

STT ne estas nura kompilaĵo el jam ekzistantaj terminaroj plej altkvalitaj nome „Enciklopedia Vortaro” de W ŭ s t e r kaj „Plena Vortaro” de SAT. Ĝi enhavas precipe tiujn terminojn, kiuj ne troviĝas en Plena Vortaro, kaj ĝi montras nur tiujn konatajn, kiuj estas vere necesaj kiel fundamentaj radikoj. **Scienca kaj teknika terminaro** ankaŭ ne nur estas vortaro en la komuna senco por serĉi maloftan terminon de scienco kaj tekniko, ĝi ankaŭ celas esti gvidilo por tiuj, kiuj elpensos novajn vortojn. Kompreneble STT larĝe allasas kritikojn, instigojn kaj komplementon.

Jenaj fakoj estas iom detale pritraktitaj:  
aeronaŭtiko, elektrotekniko, fiziko, kemio, maraferoj kaj ŝipotekniko, maŝinfako, matematiko, medicino (kuracista scienco), meteorologio, radiofako, telefonio, telegrafio, telekomuniko;

kelkajn gravajn terminojn ĝi enhavas pri la fakoj:  
botaniko, zoologio, arkitekturo, fotografio, juro, komerco, trafiko.  
Konsiderante ke la nun tre aktuala ideo de **Lingvonormigo en scienco kaj tekniko** (vd. la samenomitan broŝuron de E. W ŭ s t e r) ne toleras pluan prokrastiĝon, sed estas malhelpata per la fakto ke la malnovaj fakterminaroj ne plu estas haveblaj kaj ke la Enciklopedia Vortaro de W ŭ s t e r aperis nur parte, la du verkistoj de ĉi tiuj linioj intencis publikigi preskaŭ ĉiujn jam ekzistantajn terminojn en ĉi tiu eldono de STT, sed en interkonsento kun samideano prof. d-ro F. J. Belinfante ili forigis el la terminaro ĉiujn iom dubajn vortojn, kiuj ankoraŭ bezonas sufiĉe da klarigo fare de diskutado en terminologiaj laborrondoj. Tiamaniere ni evitas eternigi eventualajn erarojn troviĝantajn en la ĝisnunaj malnovaj terminaroj. La verkistoj de ĉi tiu STT rezignas publikigi poste suplementon, tamen ili kolektos laŭfakte la provizore forstrekitaĵojn, por sciigi ilin al la Terminologia Sekcio de ISAE kaj por ke ili aperu post sufiĉe zorgema klarigo en estontaj fake apartaj terminologioj kiuj baziĝos sur nia propono de STT.

Estis malfacile trovi kontrolemulojn por ĉiuj fakoj; tiu verkada maniero cetere estis evitinda por ne perdi ankoraŭ pluan tempon por publikigi la STT'n. Tial ni devas emfazi la provizoran karakteron de la terminaro. Tamen la du verkistoj decidis eldoni ĝin jam kiel „Proponon”, por ke la samideanoj en scienco kaj tekniko jam nun havu en siaj manoj fundamenton — skeleton de leksikono — por legado de faka literaturo kaj por propra artikolverkado.

Tial STT estos la bazo por estonta pli ampleksa verko, en kiu efektiviĝos kolekto de aparte elverkitaj detalaj fakvortaroj de ĉiuj fakoj de la homa scio, do vera „**Plena scienca kaj teknika terminaro**”! La du aŭtoroj nepre ne ambicias mem verki ankaŭ estontan plenan vortaron pli detalan en ĉiuj fakoj kaj ordigotan laŭ la Dekuma Klasado — ne alfabeto —, male ili intencas publikigante ĉi tiun proponon, instigi la komunan terminologian laboradon de ISAE kaj SAT.

STT estas ordigita laŭalfabete same kiel PV. Ĉiu termino havas, en krampoj, noton pri la fako, al kiu ĝi apartenas, kaj pri la vortaro aŭ aŭtoro, kie ĝi jam troviĝas. Post la difino estas nomata, laŭbezone, la koncerna termino germana aŭ angla; kelkfoje, se difino estas tro malfacila, ekz. ĉe botanikaj terminoj, ĉi tiun anstataŭas la latina termino aŭ la DK-indico (Universala Dekuma Klasado). Se temas pri kunmetita vorto, ekz. „savbuo”, oni serĉu unue laŭ la ĉefa nocio „buo”, ĉe kiu oni trovas la kromajn aŭ derivitajn nociojn. Sed kelkfoje ankaŭ la derivita nocio troviĝas en la alfabeto ordo.

R. H.